Friedrich Schiller,

Al la ĝojo

tradukita de Kálmán Kalocsay

Ĝoj'! Fajrero belradia!
Elizea di-filin'!
fajrebrie ni al via
templo iras, preĝi vin.
Ĉesu, de vi sorĉligate
de l' rigora mod' la ŝir',
ĉiuj homoj sentas frate,
se vi ŝirmas per flugil'.

Ĥoro:
Jen brakumoj al milmiloj,
Jen ĉi kis' al tuta mond'!
Fratoj! super stela rond'
loĝas patro por ni, filoj!

Se la granda ĵet' bontrafis
kaj amikon gajnis vi,
se virina am' vin ravis:
Vin enmiksu kun ĝojkri'!
Jes, se eĉ nur unu koro
estas via en la mond'!
Kaj se ne – do vin kun ploro
ŝtelu for el nia mond'.

Ĥoro:
Ĉiu sub ĉielo glata
donu sin al simpati',
al la steloj gvidas ĝi,
kie tronas Nekonata.

Ĉiu sur la brust' Natura
suĉas sukon de la ĝoj'
kor' malbona, koro pura
sekvas ŝin laŭ roza voj'.
Ŝi vinberojn, kisojn donas
kaj amikon sen pridub',
en volupt' la vermo dronas,
vidas Dion la kerub'.

. . .

Friedrich Schiller,

Al la ĝojo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Ĝojo, bela sparko dia,
de l' ĉielo vi filin',
ĝoje staras ni en via
templo kaj adoras vin.
Sorĉe ĉio religiĝas,
kio apartigis sin,
ĉiuj homoj gefratiĝas,
kie vi restigas vin.

Ĥoro:
Estu chirkaŭbrakumitaj,
lasu kisi vin, homar' !
Estu unu amikar'
ĉiuj homoj disigitaj![2]

Se vi faris grandan ĵeton
kaj amikon gajnis vi,
aŭ akiris virineton,
kunjubilu vi kun ni !
Ja – se vin nur amas iu
en la bela, vasta mond'!
Kiu restas sola, tiu
plore iru el la rond'!

Ĥoro:
......
......
......
......

......
......
......
......
......
......
......
......

. . .

[2]Tiu verso ne tute redonas la enhavon de la koresponda origina strofo.

Ĥoro:	Ĥoro:
Ĉu genuas vi, milmiloj?	......
Vi kreinton sentas, mond'?	......
Serĉu super stela rond',	......
loĝas Li trans astro-briloj!	......
En eterno de l' Naturo	......
Ĝojo estas la risort'.	......
En la mondhorloĝ' por kuro	......
radojn pelas ŝia fort'.	......
Ŝi el ĝermoj logas berojn,	......
sunojn regas ŝia gvid'	......
Ŝi tra l' spaco rulas sferojn	......
trans la astronoma vid'.	......
Ĥoro:	Ĥoro:
Kiel sur la pompaj vojoj	......
sunoj sur la firmament',	......
gaje marŝu, frata gent',	......
kiel venki la heroojn!	......
Esploriston ŝi alridas	......
el la fajrspegul' de l' Ver',	......
sur krutaĵ' de l' Virto gvidas	......
ŝi la homon de toler',	......
sur Kred-Monto sunobrila	......
flirtas ŝia flag' el or',	......
ŝin tra l' fendo ĉerk-kovrila	......
vidas ni en anĝel-ĥor'.	......
Ĥoro:	Ĥoro:
Ho toleron, paciencon,	......
fratoj, por pli bona mond'!	......
Donos super stela rond'	......
granda Dio rekompencon!	......
Ĉu pripagi diojn? Vanto!	......
Ĉu simili? Bela pen'!	......
Venu ĝoji kun ĝojanto	......
la mizero, la ĉagren'.	......
Venĝ'? Kolero? En forgeson!	......
Jen pardon' al malamik'!	......
Liaj larmoj havu ĉeson,	......
lin ne boru pento-pik'.	......
. . .	. . .

Ĥoro:
En ŝuldlibroj plu nenio!
Mondon regu harmoni'!
Fratoj! Kiel juĝis vi,
tiel juĝos pri vi Dio!

Ĝojo ŝaŭmas en pokaloj,
en orsango de l' vinber',
mildon trinkas kanibaloj,
heroecon malesper'.
Se rondiras la botelo,
fratoj, saltu el la sid',
ŝprucu ŝaŭmo al ĉielo:
Jen ĉi glas', por Bon-Spirit'!

Ĥoro:
Himnas Lin abismo stela,
serafar' kun glora cit'.
Jen ĉi glas' por Bon-Spirit',
supre, trans la tend' ĉiela!

En suferoj: firma forto,
al senhelpaj: ŝirma brust',
eternec' al ĵura vorto,
eĉ al malamiko: just'.
Virfiero kontraŭ tronoj,
kvankam sangon kostu spit',
al merito estu kronoj,
kaj pereo al insid'!

Ĥoro:
Fermu vin en sankta rondo,
Ĵuru do kun glaso-lev',
pri l' fidelo al la Dev',
je l' Reganto de l' Stel-Mondo!

Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de FRIEDRICH SCHILLER *(Frederiko Ŝilero, ∗1759 – †1805) en Esperanton de* KÁLMÁN KALOCSAY *(Kalmano Kaloĉajo, ∗1911 – †1976) en 1958.*

Arg-133-263 (2004-01-16 21:13:09)

Ĥoro:
......
......
......
......

......
......
......
......
......
......
......
......

Ĥoro:
......
......
......
......

......
......
......
......
......
......
......
......

Ĥoro:
......
......
......
......

Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de FRIEDRICH SCHILLER *(Frederiko Ŝilero, ∗1759 – †1805) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1982.*

Arg-133-264 (2004-01-16 21:22:19)